

# Agendo de Greziljono

## kalendaro de eventoj en 2014

- 2014-mar-15 → 16
  - Semajnfino por laboremaj volontuloj. Ni konstruas, riparas kaj plibeligas en la kastelo, zorgas pri arbustoj...
- 2014-apr-06 → dimanĉo 14-18h : Tago de malfermata pordo kun la turisma oficejo de Baugé
- 2014-apr-11 → 18
  - [L'anim' de la poezi'](#), atelieroj de verkado, laŭtvoĉa legado, Ludo de la Fenikso *en franca lingvo*



- 2014-apr-19 → 26
  - [FRINGOJ](#), *Festa Renkonto Internacia de GeknabOJ* por infanoj kaj gejunuloj 8/18-jaraj, grupoj de esperanto-lernantoj kaj iliaj instruistoj
  - kunlabore kun Elisabeth Barbay « elizbabel @ gmail.com » kaj la asocio Esperanto Bondy



- 2014-apr-26 → maj-03
  - [PRINTEMPaS](#) : Intensivaj kursoj kun Radojica Petrović el Serbujo, Christophe Chazarein el Okcitanujo kaj Jean-Luc Kristos el Aŭvernjo
- 2014-maj-03 → 04
  - [PRINTEMPaS](#) : Internaciaj KER-ekzamenoj (B1, B2, C1)



- 2014-maj-08 → 11
  - Ĥorrenkonto de *Interkant' plu* kun Zdravka kaj Maja, kontakto per manjo.clopeau @ gmail.com
  - [Muzika komedio](#) *La Eta Arturo* kun Isabelle Nicolas, kontakto per isabelle.nicolas2 @ gmail.com

- 2014-maj-11 → 17
  - [Renkonto de rememoroj](#) kaj rakontoj inter malnovaj esperantistoj kaj/aŭ iamaj gastoj de Greziljono
  - Ĉiu rakontas siajn anekdotojn, pri Greziljono kaj Esperantujo ; oni kune verkas belan tekstaron por eldoni ĝin kiel [Kultura Kajero](#)
  - Krome kantado kun Jean-Luc, libro-bindado kun Caroline, promenado tra la parko



- 2014-maj-18 → tuttage : [Membrokunvenoj ĝeneralaj](#) normala kaj eksterordinara kun voĉdonado (alveno eblas sabate)



- 2014-jun-29 → jul-06
  - [Turisma semajno](#) : tuttagaj ekskursoj al reĝaj kasteloj ĉe rivero Luaro kaj rezidejoj de renesancaj artistoj
  - Gvidos en Esperanto : Catherine Kremer, profesia ĉiĉeronino, laŭ [tiu programo](#)
  - Esperanto-kurso, kantado kaj dancado kun Jean-Luc Kristos



- 2014-jul-07 → 28 : Infanferiado (privata societo) ...

- 2014-aŭg-01 → 09
  - [Sennacieca semajno](#) alternativa, [SAT](#)-antaŭ-kongreso
  - Prelegserio pri korea natura kuracado kun Junĉjo, pri rusa pentrarto, surrealismo kaj kubismo kun Nina
  - Cseh-kurso kun Luz, paroliga kurso kaj teatraĵoj kun Nina, posttagmezaj ekskursoj al regionaj vidindaĵoj



- 2014-okt-24 → nov-02
  - AŬTUNE : La komunaj ferioj por infanoj, familioj kaj geavoj.
  - Kursoj, koncertoj, promenado, skoltado, ludoj kaj aliaj aktivaĵoj laŭ via elekto



- 2014-dec-27/28 → jan-02/03 : Jarfina FESTego kaj Silvestra (Novjara) FESTeno laŭ franca maniero kun maskobalo (*konfirmenda*)

# Greziljono invitas vin rakonti viajn memorojn tuj antaŭ la membrokunveno



Renkonto de rememoroj kaj rakontoj  
inter malnovaj esperantistoj kaj/aŭ iamaj gastoj de Greziljono  
de dimanĉo, 11-a ĝis sabato, 17-a de majo 2014

## ENHAVO

### • AKTIVAĴOJ

- La partopreno en la aktivaĵoj estas libera, venu kiam vi deziras, ripozu kiam vi bezonas
- [Jean-Luc Kristos](#) (Aŭvernjo) De Estintec' al Estontec' ! *Kiel utiligi niajn memorojn por novbakitaj aŭ venontaj esperantanoj ?*
- [Caroline Mauboussin](#) (Tureno) Libro-bindado laŭ pralula maniero
- [Jean-Luc Kristos](#) (Aŭvernjo) Kantu ni ! – Dancu ni !
- Isabelle & Jean-Luc (Francujo) Promenado tra la parko
- Aŭskultu kaj kunkantu *Somer' en Greziljon'*



## Aktivaĵo : REMEMOROJ

- De Estintec' al Estontec' ! *Kiel utiligi niajn memorojn por novbakitaj aŭ venontaj esperantanoj ?*
- La ĉefa celo de estas la staĝo estas : arigi rememorojn de travivaĵoj per Esperanto. Kroma celo : disponigi al novaj generacioj utilajn spertojn.
- Vi lernis Esperanton antaŭ sufiĉe longa tempo aŭ vizitis Greziljonon jam antaŭ multaj jaroj. Vi foje travivis tre belajn momentojn en Esperantujo kaj volonte memoras pri ili. Certaj eventoj estis aparte interesaj. Vi ŝatus ilin rakonti al aliaj homoj, vi ŝatus ilin noti en konvena formo, por ke ili ne perdiĝu. Vi kunportas malnovajn fotojn kaj revuojn, kiujn vi ŝatus montri al viaj malnovaj amikoj.
- Dum tiu ĉi staĝo, malnovaj esperantistoj babilos pri la agrabla, fora tempo, kiun ili travivis per Esperanto. Ĉiu rakontas siajn anekdotojn, pri Greziljono kaj Esperantujo. Tiujn anekdotojn vi mem notas aŭ vi diktas. Oni kune verkas belan kolekton de rememoroj por eldoni ĝin kiel novan numeron de [Kulturaj Kajeroj](#), la revuo de Greziljono.
- Kelkaj ideoj por eki : Kiel mi ekkonis Esperanton ? Kial mi ĝin lernis ? Kiel mi lernis ? Kiel mi uzas ĝin ? Kiucele mi uzas ĝin ? Kiu estas mia plej agrabla rememoro ? Mia plej kortuŝa ? Ĉu valoris uzi Esperanton ? Ĉu daŭre valoras ĝin uzi ? .....
- **Joloko/Jean-Luc** vigligos la babilan rondon en etoso ĝoja kaj feriemaj, eble kantema. Dum la verkado de la tekstoj, li povas helpi pri redaktadaj malfacilaĵoj.



## Aktivaĵo : LIBRO-BINDADO

- Venu *bindi* vian propran esperantan libron en nia ateliero de libro-bindado.
- Pluraj jam lernis [bindadon](#) (dum tri aŭ kvar staĝoj) kaj estis tre fieraj kaj agrable mirigitaj ! Dum la lastaj jaroj ĉeestis litovino, hispanoj, ĉino, flandrino, germanino ... kaj eĉ franco !
- Do, se vi deziras ... bonvenigas vin nia bindistino **Caroline**.
- Por tiu laboro necesas kontroli sin, lerte agi kaj forte koncentriĝi dum du horoj, do partoprenanto estu almenaŭ 8- ĝis 10-jara.



- PREZO**
- Ĉioinkluziva prezo por kompleta restado de sabato (vespermanĝo) ĝis sekva sabato (tagmanĝo) : inter 279 kaj 472 € (tendejo 239 €)
  - Redukto de 5% validas por aliĝo kun antaŭpago de 100 € almenaŭ 2 monatojn antaŭ komenco.
  - Ĉiuj niaj tarifoj [tie](#). Ekstrakto : ĉambro 9-38 €, kampadejo 3 € ; matenmanĝo 4 €, tagmanĝo 10 €, vespermanĝo 9 €, kurso kaj programo 70 € semajne.



Aliĝo kaj prezoj:

interrete: [gresillon.org/s1](http://gresillon.org/s1)

telefone: 033-2 41 89 10 34